But the crudity of the Mohawk language shows best in its very words. "Old man" had the form "old he"; "wise man," "wise-he," and, ridiculously enough, "wise woman" was "she-wise-he." The words for the most part did not take form so reasonably, for example, *ah-dah*, "day"; *nah-di-wa-nio-ha-ge*, "daily, by day."

Evidently, these aborigines were not impressed by the extreme importance of some logical basis of word-formation. Terribly long were even ordinary words with them; "will" was *he-ni-di-sah-ni-go-oh-da-ah*; "royalty"—let us leave out the hyphens—was *nedwanohdoosahgwenniyuh*. Enough, the language fully deserved its fate!

Today twenty-nine languages of as great a number of nations take the place of the Mohawk,—twenty-nine where there was one. See how the old gives way to new! People drive away people; language, language. How many of the present inhabitants of the valley—

pri ĉi tiu forvelkita popolo sur kies antaŭaj grenkampoj staras iliaj domoj? Nur malnovaj dokumentoj rememorigas pri ili; forgesitaj estas eĉ la lokoj kie ili enteriĝis, kun "mokasenoj al la pordoj de la mateno."

Restas de la ruĝhaŭtuloj nenio krom la nomo de la rivero; kaj en la tuta valo, sendube, la skribanto sole pripensas hodiaŭ nokte pri la *On-gue-hon-we*, Viroj Superantaj Ĉiujn Aliajn.

JAMES F. MARTIN

half of whom were born in Europe—ever gave thought to this vanished people on whose aforesaid grain fields stand their houses? Only old documents recall them; forgotten are even the places where they lie buried, with their "Moccasins toward the gates of the morning."

There remains of the redskins nothing more than the name of the river; and in the whole valley, doubtless, the writer alone is thinking tonight about the *On-gue-hon-we*, "Men Surpassing All Others."

La Drinkinto

DI jus alvenis Londonon de la kontinento, kaj apenaŭ trafis suden ĉirkaŭurban vagonaron, kaj nin gratulis ĉar ni havas tutan kupeon por ni solaj, kiam la vagonaro haltis ĉe Londona Ponta stacidomo, kaj grupo da gajaj kaj bruemaj knaboj tute plenigis la kupeon.

Nian unuan ĝenaĵon tuj sekvis intereso je la ekscitiĝo de la junaj buboj, kiuj ŝajnis esti treege feliĉaj. Evidente ili estis knaboj de unu el la plej malriĉaj kvartaloj de Londono, kiuj estis havantaj tre maloftan plezuron, tio estas, festotagon en la kamparo.

Jus kiam la vagonaro estis ekiranta, maljuna laboristo eniris kaj post kiam la knaboj deiris de lia vojo li sidiĝis kaj demandis ĉu la fumado estas malagraba al ni. Mia edzino ne estis tute resanigita de la marmalsano, kaj la fumado eble pligrandigus ŝian malkomfortecon, tial mi diris ke ni elektis tiun kupeon ĉar ĝi estas malfumejo.

Gajege li respondis, "Mi supozas ke estus pli bone al mi se ne fumus." Tiam mi demandis al li ĉu li alkondukas kursaron de dimanĉlernejo al pikniko, kaj li respondis ke ĝi estas abstinencklubo de knaboj organizita de li mem. Li diris

ke la knaboj ne nur estas abstinenculoj, sed ili ankaŭ rifuzas iri al la drinkejoj por alporti bieron al siaj gepatroj. Ĉi tiu decido de la knaboj havas laŭ li bonan edukatan efekton je kelkaj el la gepatroj.

Pro la influo de tiu viro, kies sola kapablo ŝajnis esti lia amo por tia okupado, grupo da stratbuboj, kiuj alie eble fariĝus krimuloj, estas edukataj por iĝi virtuloj.

Tiu laborado ne estas senkosta al la maljuna viro. La veturpago por la grupo estis pli ol tridek ŝilingoj. Tamen ĉiun aŭtunon li donas al siaj knaboj piknikon, kaj en ĉiu vintro teotrinkadon. Tiuj ĉi regaloj kostas al li la ŝparadon de multaj semajnoj.

Montrante al ni siajn manojn li diris, "Vi vidas ke mi estas laboristo kaj ne povas akiri multe da mono. Tial mi estas tre ŝparema, por ke mi povu helpi tiujn knabojn kaj ilin savi ke ili ne fariĝu drinkuloj."

"Kial vi ekpensis pri ĉi tio?" mi demandis.

"Mi iam estis drinkulo mem," li respondis, "sed antaŭ dudek sep jaroj mi ekfariĝis sobrulo; kaj la monon, kiun mi antaŭe elspezis por drinkaĵo, mi nun elspezas por savi la knabojn."

DOKTORO RESANIGITA.

His Highness Raj-Rana Sir Ehawami Singh Bahadur, K. C. S. I., a progressive Indian prince, has begun to study Espe-

ranto, having already become sufficiently expert to be able to write a letter in the language.

Kiel Du Dingoj Venis en Jorkŝiron

DE F. ST. MARS.

DEVAS esti supozite, ke antaŭ ol Joĉjo Warrigal kaj lia edzino finis la vojaĝon de Aŭstralio al Kardifo en Kimrujo en kaĝo, kiu videble estis tro malgranda por esti komforta, ili jam sufiĉe kutimiĝis al surprizoj. Ili estis *dingoj* (latine, *canis dingo*), aŭstraliaj sovaĝaj hundoj, kaj personoj kiuj konis ilin sur iliaj patrujaj kampoj donadis al ili malbonan reputacion,—t. e., malbonan rilate dingojn, kaj tio diras multe. Oni sendis ilin al tersinjoro en Skotlando, kiu havis ŝaton por strangaj bestamikoj. Kredeble li sciis nenion pri ilia karaktero, tamen oni ne povas klarigi la ŝatojn de iuj homoj.

La vagonaro, kiu veturigis ilin norden, elektis unu el la plej sovaĝaj distriktoj en Jorkŝiro deĝi de la reloj en profunda nokto, kaj tiam la dingoj ja surpriziĝis. Dum kelkaj minutoj post kiam ilia malgranda mondo ĉesis trakti ilin kiel ludkubojn en ĵetujo, la Warrigaloj kuŝis kviete, ne tial, ke ili estis difektitaj, sed nur tial, ke ili estis dingoj. Ĉe tiuj bestoj estas kutimo ŝajni morton kiam aferoj iras neordinare malbone.

Fine ili sidiĝis, kaj palpis tutan sian korpon per la nazo, por certiĝi, ke neniuj partoj perdiĝis en la konfuzo. Post tio ambaŭ ellasis bleketon kaj faris salteton, ĉar ili samtempe ekvidis, ke unu flanko de la kaĝo rompiĝis kiel ovoŝelo. Ili tremante eliĝis, kaj restis kelkajn momentojn por rigardi la komercaĵajn vagonojn amasigitajn kiel oni amasigas kolekton da rompitaĵoj orangaj kestoj.

Tiam ili translokiĝis. Kiam dingo translokiĝas, kaj la timo sidas sur ĝia dorso, ĝi piedbatas la mejlojn malantaŭen, kiel galopanta ĉevalo piedjetas malantaŭen terbulojn sur plugita kampo.

En la nuna okazo ili kuris dek kvar mejlojn en malpli multe da tempo ol mi kuraĝas diri al vi, antaŭ ol ili haltis sur la supro de izola longaltaĵo. Ili enflaris la aeron kaj trovis ĝin bona. Ĝi odoris je libereco. Ia aero ja tiel odoras; sur la montoj kaj montetoj oni ĝin trovas, kaj

ĝin konas ankaŭ la maro. La vento ankaŭ ŝajnis kanti pri libereco, per murmuranta kanto inter la plumaj herboj en la mallumo. Ili plue rimarkis, ke la ĉi tiea mondo ŝajnas konsisti el titanaj kaj renversitaj altaĵoj, el inknigraj malplenoj inter ĉi tiuj, el blunigra ĉielo kaj steloj.

Tiam ŝafo blekis. Eble tio ne ŝajnas grava, tamen la dingoj eksaltis en atentan pozon, kiel povus fari malnova soldato, kiu aŭdus trumpeton. Ili konis tiun sonon; ĝi estis la unua familiara sono, kiun ili ĝis nun aŭdis en ĉi tiu malvarma, malmola lando. Posta esploro laŭ la ŝtelira kaj kaŝema naturo de la dingo malkaŝis aron de ĉirkaŭ kvarcent ŝafoj. Tuj la dingoj eklaboris. Mi diras, ke ili eklaboris, kaj mi lasas la aferon ĉe tiu punkto, ĉar la laboro estis sanga, kaj, post la mortigo de la unua ŝafo, ĝi estis tute nenecesa.

Kiam la dingoj finis kun la ŝafoj, ne plu troviĝis kvarcent ŝafoj en la aro, sed nur tricent ok dek, kaj la ceteraj du dek diskuŝis kuntiriĝinte en diversajn pozojn, kun la gorgo elŝirita.

La duo nun klopodis por meti komfortan distancon inter si kaj sia faritaĵo. Ili sciis, ke nepre certaj fenomenoj sekvos buĉadon tian, kian ili ĵus faris. Ekzemple, kaptiloj, veneno, kaj kugloj, kiuj lastaj povas veni sen averto el kia ajn loko.

Post kelka tempo ili alvenis pinarbaron kvazaŭ ĵetitan sur la flankon de valo, kaj en la pinarbaro troviĝis ruiniĝinta domo. La loko estis sovaĝa, kviete, nigra kaj dezerta, kaj en ĝi loĝis noktaj kreitaĵoj, kiuj kuradis en la ombroj pri siaj propraj sekretaj aferoj. Ĉi tie gesinjoroj Warrigal faris al si hejmon en ĉambro, kiu iam estis saloneto, sed jam estis cedita al la vespertoj, ratoj, fortkreska herbo kaj hedero. Ĉi tie ankoraŭ en tiu nokto, sinjorino Warrigal donacis al sia edzo du dingidojn. Eble troviĝis pli belaj, pli grasaj, pli gajaj etuloj, ol tiuj du baldaŭ fariĝis, sed se tiel estas, mi neniam vidis tiajn.

Post ĉirkaŭ kvar noktoj la granda vir-

dingo, ĉasante sola, trafis ripozantan ŝafaron, kaŝitan izole en faldo de la montetoj. Baraĵoj estis starigitaj ĉirkaŭ tiuj ŝafoj, sed la dingo superiris ilin per salto, kaj kiam li ĵus komencis sian malbonan agadon, homo kriegis el la mal-lumo. La proksiman momenton venis, saltante super la baraĵojn, kolo ĉe kolo, du grandaj hundoj sen videblaj vostoj, ĉiu vestita de implikaĵo el blugrizaj haroj, kaj havanta strangajn okulojn. Ili diradis ion per nelaŭta tono profunde en sia gorĝo, kaj Joĉjo Warrigal pensis, ke ili diradas "mortigon."

Ne sciante kio proksime venos, la intencanta kaŝmortigisto rapidege retiris sin. Tio estas, li saltis super la baraĵojn kiel ia rapidanta ruĝeta ombro, kaj malaperis. Li iris malsupren de la deklivo de la monteto en rulfalaĵo el nefiksitaĵoj, sed la strangokula duo estis proksime sekvanta lin, kaj lia koro bategadis.

Post dek minutoj oni povus vidi la maljunan virdingon galopanta per liberaj saltoj al la pinarbaro, kiu kaŝis lian hejmon. La besto ŝajnis tre granda sub la pala lumo de la neklara ĵus leviĝinta luno, kaj liaj okuloj iam kaj iam ekflamis per stranga verda brilo kiam la lumo falis sur ilin. Li haltis sub la ombro de granda pino, kaj tuj fariĝis nevidebla. Li enperdiĝis en ombroj, kaj tiuj ombroj enperdiĝis en aliaj ombroj. Tiam la kraka sono de kunfrapiĝintaj ŝtonoj venis supren al li de iom malsupre sur la deklivo, kaj li sciis, ke tio estas la mallongvostaj paŝtistaj hundoj,—tiaj ili estis. Tiuj hundoj deziris havi la dington. Nu ili ricevis lin,—eĉ pli multe da li ol ili deziris.

La unua hundo alvenis nesingarde kiel iu ekscita urso, kaj Joĉjo Warrigal ĝin renkontis. Tiu renkonto fariĝis sen averto. Nur ekvidiĝis la ruĝeta felo kaj strio da dentaroj, kaj la forto de la kunfrapiĝo jetis kaj la persekutanton kaj la persekutaton en ĉirkaŭprenon de sovaĝa rozo. Rapide kiel penso la dingo leviĝis kaj turnis la vizaĝon al la dua hundo, kiu tuj retiris sin rapide kaj senhonte en la nokton. La unua hundo ne levis sin, fakte ĝi jam finis kun la mondo, ĉar ĝia gorĝo estis tute traŝirita. Tiam la dingo singarde elektis kaj iris sian vojon el la arbaro. Li jam faris, eĉ ĉe dingo, tion, pri kio li opiniis, ke ĝi estas kontentiga laboro por unu nokto.

La famo de la dingoj disvastiĝis, kaj aferoj fariĝis ekstreme vivaj. Ne estas bona famo nek sendanĝera tiu, kiu rilatas al kalkulita nombro da ŝafoj perforte mortigitaj en certa nombro da noktoj, sen videbla kaŭzo. La ŝafgardistoj, en tiuj teruraj tagoj, marŝadis tage kaj nokte kun pafiloj, kaj estis nenia sendanĝereco en la distrikto. Hundoj grandnombre estis mortigataj, sed la mortigo de ŝafoj neniom ĉesis.

Tio sola de la mistera terurajo, kion homoj iam ekvidis, estis subita salto de ruĝeta korpo, vidita kaj malaperinta kiel strio de fulmo. La afero fariĝis inkubo.

Unu nokton la Warrigaloj ekiris por rabi, kiel jam estis ilia kutimo. Ili konis bienon malproksiman ĉirkaŭ kvin mejloj—ili neniam malbone kondukis pli proksime de sia hejmo ol tiom—kie estis ŝafoj kaj multe da hundoj. Interesis ilin la hundoj, ĉar tiuj trompis sin, ke ili povas venki ĉian beston. Dum ili kaŝiris kiel sensonaj ombroj tra ulekso densejo, Joĉjo subite haltis kaj ellasis koleran bojeton. Lia edzino, kiu estis malpli ruza, kaj ĉiam sekvis post li, ankaŭ haltis, kaj, sidiĝante sur la tero, postulis klarigon per mallaŭta plendkrio. Joĉjo Warrigal ekstreme singarde elektis paŝlokojn ĝis kiam li staris super amaseto da herbo kaj branĉetoj. Sub tiu amaseto kuŝis kaptilo, kruelega afero kun ŝtalaj dentaroj, kion rigardi fluigis malvarme la sango. Tiam la dingo disjetis malpurajon sur ĝin, kaj ĝin lasis. Tio montras ke eĉ sovaĝa hundo povas havi evidentan senton de ŝercado.

Fine li atingis la bienon, kadavre palan en la lumo de sinkaŝema, per nebuleto kovrita luno. Ili trovis la ŝafojn en herbejeto,—ili jam antaŭe vizitis ĝin, tial ili sciis kie serĉi.

Tuj ili ĵetis sin en la ŝafaron, kuregis tien kaj ĉi tien, farante rapidajn ŝirantajn mordvundojn per la dentaroj en la gorĝon de la ŝafoj. Ĉiu ekmordo mortigis ŝafon, kaj la loko fariĝis buĉejo. Subite sen ia averto, pafilo eksplodis kun mallonga, kraka ekbruo simila al sola kunbato de la manoj. Sinjorino Warrigal faletis, faris strangan sufokan tuson kaj malaperis en la mallumon.

Estante singardema besto, kaj havante en si la timon de la morto, la virdingo reiris hejmen per granda rondo.

Sur la sojlo de la ruiniĝinta domo li

rigidiĝis, tremetis, kaj ŝtoniĝis kvazaŭ statuo. Li direktis la rigardon sur la plankon, kie kuntiriĝinta, lia edzino kuŝis mortinta—ŝi ne faletis kaj tuisis pro nenio. Plue, la dingidoj estis malaperintaj, kaj estis aparta homa odoro en la aero.

Fine post kvin doloraj minutoj, Joĉjo Warrigal turnis sin tre malrapide kaj iris malfacile, kiel ia arta besto moviĝanta per horloĝa risorto, al la malgranda senorda ĝardeno herbejeto antaŭ la domo. Tiam—

Mi opiniis ke li freniziĝis, sed mi ne estas certa. La homoj kiuj ŝtelis la dingidojn revenis la proksiman matenon laŭ la sanga postsignaro de sinjorino Warri-

gal. Ili raportis, ke la herbejeto estas gratfosita de fino ĝis fino. Plie, ili trovis, apud la kadavro de la dingo, Joĉjon Warrigal mem—grandan fortegan ruĝan hundon—rigidan kaj malvarman en la morto. Pro tio, ke la spirito de la amo estas altvalora kaj malofta, mi volas kredi, ke ĉi tiu dingo-hundo, ĉi tiu trudulo, mortis pro rompiĝinta koro. Oni povas pensi pli bonkore pri li, se oni akceptas ĉi tiun teorion, kaj—kiu scias?—povas esti, ke la bestoj ja amas.

El la angla tradukis

GEGO,
Hawthorne, Victoria,
Australia.

La Vojaĝanto kaj la Templo de la Scio

ANTAŬ multe da centjaroj Vojaĝanto, lacigite pro longa marŝado, alproksimiĝis al la pinto de alta monto. Sur tiu monto troviĝis templo, kaj la Vojaĝanto jam jure promesis al si ke li alvenos al ĝi antaŭ ol la morto lin haltos. Li bone sciis ke la vojaĝo estos longa, la vojo malebena kaj ŝtonplena. Li sciis ke oni povos malpli facile supreniri tiun monton ol iun ceteran en la montaro, kies nomo estis La Idealoj. Sed li havis koron esperplenan, kaj kvankam li perdis scion pri la tempo, li neniam perdis la espersenton.

“Eĉ se mi svenos ĉe la vojoflanko,” li diris en si mem, “kaj ne povos alveni al la montopinto, tamen multe valoros vojaĝi sur la vojo kiu kondukas al la Altaj Idealoj.”

Tiel li sin konsolis kiam ajn li laciĝis. Neniam li perdis pli multe da espero ol tiom, kaj certe tiom estis mal multe.

Kaj fine li alvenis al la templo. Li sonorigis la sonorilon, kaj blankhara maljunulo malfermis la pordegon. Li ridetis malgaje kiam li vidis la Vojaĝanton.

“Kaj jen ankoraŭ alia!” li murmuris. “Kion signifas ĉio ĉi?”

La Vojaĝanto ne aŭdis tion kion li murmuris.

“Maljuna blankharulo,” li diris, “sciigu min ĉu fine mi estas alveninta al la mirin-

da Templo de la Scio. Ĉi tien dum mia tuta vivo mi vojaĝis. Ho, estas laciga laboro suprenrampi al la Idealoj.”

La maljunulo tuŝis la brakon de la Vojaĝanto. “Aŭskultu,” li diris per kvieta voĉo. “Ĉi tiu ne estas la Templo de la Scio. Kaj la Idealoj ne estas ĉeno da montoj; ili estas granda ebenajaro, kaj la Templo de la Scio troviĝas meze de ĝi. Vi elektis la malĝustan vojon. Ho ve! Kompatinda Vojaĝanto!”

La lumo en la okuloj de la Vojaĝanto malaperis. La espero en la koro mortis, kaj li ekmaljuniĝis kaj velkiĝis. Li sin apogis peze sur sian bastonon.

“Ĉu estas permesate ripozi ĉi tie?” li demandis lace.

“Ne.”

“Ĉu troviĝas sur la cetera flanko de ĉi tiuj montoj vojo kiu kondukas malsupren?”

“Ne.”

“Kio estas la nomo de ĉi tiuj montoj?”

“Ili ne havas nomon.”

“Kaj la templo—kio estas ĝia nomo?”

“Ĝi ne havas nomon.”

“Do, mi nomos ĝin la Templo de Rompigataj Koroj,” diris la Vojaĝanto, kaj li sin turnis kaj foriris. Sed la blankhara maljunulo sekvis lin.

“Frato,” diris li, “vi ne estas la unua kiu ĉi tien venis, sed eble vi estos la lasta. Reiru al la ebenajaro kaj diru al la tieaj loĝantoj ke la Templo de la Vera

Scio troviĝas meze de ili; iu ajn kiu deziras povas eniri ĝin; la pordegoj eĉ ne estas fermitaj. Ĉiam la templo troviĝis en la ebenaĵaro, en la koro de la vivo, de la laborado, de la ĉiutaga pensado. La filozofo povas eniri, la ŝtonrompisto povas eniri. Certe vi preterpasis ĝin ĉiutage dum via vivo, neornamitan, malnovan konstruaĵon multe malsimilan al niaj belegaj katedra aloj."

"Ofte mi vidis la infanojn ludantajn apud ĝi," diris la Vojaĝanto. "Kiam mi estis infano mi kutime ludis tie. Ho, se mi nur tiam estus povinta scii! Nu, la estinteco estas la estinteco."

Li volis resti apud ŝtonego, sed la maljuna blankharulo malpermesis al li.

"Ne haltu," li diris. "Se vi sidiĝos tie vi ne ree leviĝos. Kiam vi haltos vi scios kiel lacega vi estas."

"Mi ne havas deziron iri plu," diris la Vojaĝanto. "Mia vojaĝo estas finita; eble ĝi malĝuste celis sed ĝi estas finita."

"Ne restu ĉi tie," ordonis la maljunulo. "Reiru. Eĉ se via propra koro estas rompita eble vi povos helpi aliajn ke ili ne rompu siajn korojn. Tiujn kiujn vi renkontos sur ĉi tiu vojo vi povos konsili ke ili returnen iru. Tiujn kiuj nur komencas vojaĝi al ĉi tiu loko vi povos konsili ke ili paŭzu kaj pripensu kiel sen-

senca estas la ideo ke la Templo de la Vera Scio estas konstruita sur izola kaj dangehava monto. Diru al ili ke kvankam Dio ŝajnas nekompata Li ne estas tiel senkompata ke li farus tion. Diru al ili ke la Idealoj ne estas ĉeno da montoj sed iliaj propraj ebenaĵoj kie oni konstruas la grandajn urbojn, kie kreskas la maizo, kaj kie laboradas la homaro, iam malĝoje, iam ĝoje."

"Mi reiros," diris la Vojaĝanto. Kaj li ekforiris.

Sed jam li maljuniĝis kaj lacegiĝis. La vojaĝo estis longa, kaj ĉiam la malantaŭenirado estas pli laciga ol la antaŭenirado. Sufiĉe malfacile estis supreniri kiam li havis la fortikecon kaj la esperon de la vivo por helpi lin; nun kiam li ne posedis la fortikecon kaj la esperon por subteni lin, preskaŭ neeble estis malsupreniri.

Tial kredeble estas ke la Vojaĝanto ne vivis sufiĉe longtempe por realveni al la ebenaĵoj. Sed ĉu li tien alvenis, ĉu ne, tamen li komencis returneniri.

Kaj malmulte da Vojaĝantoj faras tion.

EL SHIPS THAT PASS IN THE NIGHT de
BEATRICE HARRADEN,
tradukis
SYBIL BAILEY HALL

ANEKDOTO.

Oni diras ke kiam D-ro Doyle, la verkisto kaj kreinto de Sherlock Holmes, estis en ĉi tiu lando li diris dum parolado en la urbo Indianapolis, ke multaj frenezuloj havas odoron malsimilan al tiu de cerbosanuloj, kaj ofte li povas tiamaniere juĝi ilin. Post la parolado S-ro Riley, la poeto, alproksimiĝis al li kaj diris, "Dok-

toro, via diro pri la odoro de frenezuloj tre interesis min, ĉar en ĉi tiu urbo estas viro, kiu kredas ke mi ŝuldas dek dolarojn al li, kaj mi opinias de longa tempo ke li estas freneza. Mi deziras ke vi venu kaj flaru lin!"

W. H. HUSE.

La junaj geedzoj malpaciĝis; kaj nun, kvankam la edzo ŝajnigas ke li mem estis kulpa, kaj deziras paciĝi, la edzino ankoraŭ estas kolera kaj necedema. Li diris:

"Venu ĉi tien, karulino, mi petas. Ĉu vi ne deziras vidi tion, kion mi havas en ĉi tiu pakaĵo?"

"Ho, mi povas ankoraŭ ekzisti ne vidinte ĝin."

"Nu, ĝi estas io por tiu, kiun mi amas pli ol ĉiun alian en la tuta mondo!"

"Vere? Mi do supozas ke ĝi estas la ŝelko, kiun vi diris ke vi bezonas!"

Tradukis Ho Ho.

Have You Yet Secured Your

Millidge Esperanto-English Dictionary?

An invaluable book (496 pages) printed on strong thin paper with wide margins, and durably bound.

You can not get along without it.

PRICE \$2.00

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY

WASHINGTON, D. C.

NOTE—By agreement between the American Esperantist Company and the publishers in England, we are the exclusive publishers of this dictionary in America. Any edition not carrying our imprint on cover and title-page, published and sold in this country, is either not the genuine work of Millidge, or is a pirated edition.

Are you studying Esperanto?

Do you want help?

Would you like to have your exercises corrected regularly and all difficulties explained?

WRITE FOR CIRCULAR TO

**THE AMERICAN SCHOOL
OF ESPERANTO**

WASHINGTON, D. C.

A High-Class Correspondence School of Esperanto

LA REVUO

The best literary magazine
entirely in Esperanto :: ::

The only magazine which has the constant collaboration of Dr. L. L. ZAMENHOF,
the author of Esperanto

Yearly Subscription \$1.40

Single Copy, postpaid, 15 Cents

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY

AGENTS FOR U. S. A.

N. B.—The American Esperantist Company has on hand a quantity of back numbers, equally as good as current numbers from a literary point of view. These we will dispose of, as long as they last, at ten cents a copy, twelve copies for \$1.00. We can not guarantee to send any special numbers at this rate.

Oficiala Gazeto Esperantista

Organo de la Lingva Komitato
De la Konstanta Komitato de la Kongresoj
Kaj de la Internacia Konsilantaro

Jara Abono: 5 Frankoj

Unu Numero: 50 Centimoj

Redakcio kaj Administracio:

51, RUE DE CLICHY, PARIS

EL LA DECIDARO DE LA SESA KONGRESO:

LA SESA KONGRESO MEMORIGAS AL ĈIUJ SOCIETOJ KAJ GRUPOJ, KE LA ABONO AL LA OFICIALA GAZETO ESTAS UNU EL LA PLEJ BONAJ RIMEDOJ POR HELPI FINANCE LA OFICIALAJN INSTITUCIOJN DE ESPERANTO, KAJ POR ESTI REGULE INFORMATATA PRI ILIAJ LABOROJ.

Send subscription (\$1.05) through American Esperantist Company, Washington, D. C.

Specialisto pri la okuloj kaj la spina nervo

Okulvitroj prave almezuritaj al
la okuloj.

D-RO ANTONIO ROMITO

410 Liberty Ave., Room 602, Pittsburg, Pa.

LA ONDO DE ESPERANTO

MONATA ILUSTRATA REVUO

(fondita en la jaro 1909).

La abonantoj de la j. 1912 jam ricevis senpage romanon de A. Tolstoj „Princo Serebrjanij“. kies prezo por ne-abonintoj estas Sm. 1,60 afr. Nun ĉiu abonanto de la j. 1913,—krom 12 n-roj de l'gazeto—senpage ricevos donace post kelkaj monatoj belan Esperantan libron:

„ORIENTA ALMANAKO“

el la lingvoj japana, ĥina, araba, ĥinda, sanskrita, persa, armena, kartvela k. t. p. k. t. p.

„La Ondo“ aperas akurate la 1-an daton, novstile. Ĉiu n-ro havas 16—24 paĝ. Formato 17x26. Bela kovrilo.

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda. (Poŝtk. ilustr.).

Sendu abonpagon (\$1.10) al la American Esperantist Company, Washington, D. C.

You Ought to Take

SCIENCA GAZETO

A monthly magazine entirely in Esperanto,
devoted to Science and Industry

Contains semi-technical articles on many interesting subjects. Subscribe for your own pleasure—and show each copy to some scientific friend.

Send subscription (\$1.50) through American Esperantist Company, Washington, D. C.

(Sample copy, 20 cents)

FOREIGN MAGAZINES

Bundle of ten copies, our selection,
back numbers, for only sixty cents

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY

WASHINGTON, D. C.

PASSION PLAY

1913

In the Austrian Alps

322 Peasants fill the rolls. Unspoilt
by tourists. European tour.

Write JOHN RANDOLPH, Niagara Falls,
New York



THE American Theosophist

*A magazine dealing with
Theosophy and Occultism,
Universal Peace and the
Wider Tolerance*

Official Organ of The American Section of The
Theosophical Society

Mrs. Annie Besant
President

Albert P. Warrington
Gen. Secretary, and Editor

\$1.50 a year Single Copy 15 cents Foreign \$2.00

Address: Krotona, Hollywood, Los Angeles, Cal.

IS IT WORTH WHILE

For you to have your printing done in a shop which is equipped with the latest and most improved machinery, the best materials and plenty of them, employs only skilled workmen of long experience who take pride in their work, and where every effort is made to deliver work when promised

?

If so, write us and we will be glad to assist you in solving your printing problems.

Now that the long-delayed Parcels Post is an accomplished fact, you can avail yourself of our services at the same prices as our next-door neighbor. We print anything from a visiting card to a dictionary.

ERNEST F. DOW

993 Watertown St., West Newton Sta., Boston, Mass.
The first Esperanto printer in America.

LA KOLOMBA PREMIO

A humorous sketch translated from the French of the great Dumas.

A nicely printed 48-page book, handy to carry around with you, and most enjoyable reading. Only 20 cents.

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY
WASHINGTON, D. C.

SHORT-STORY WRITING

A course of forty lessons in the history, form, structure, and writing of the short-story taught by J. Berg Esenwein, Editor of Lippincott's Magazine.



Dr. Esenwein

Story-writers must be *made* as well as *born*; they must master the details of construction if they would turn their talents to account.

May we send you the names of students and graduates who have succeeded? And the success their letters prove is *practical*. It means recognition, accepted manuscripts and checks from editors.

One student writes: "I know that you will be pleased when I tell you that I have just received a check for \$125 from Everybody's for a humorous story. They ask for more. I am feeling very happy, and very grateful to Dr. Esenwein."

We also offer courses in Photoplay Writing, Versification and Poetics, Journalism; in all over one Hundred Home Study Courses, many of them under professors in Harvard, Brown, Cornell, and leading colleges.

250-Page Catalogue Free.

Please address,

THE HOME CORRESPONDENCE SCHOOL

Dept. 542

Springfield, Mass.

DEZIRAS KORESPONDI

[Unufoja anonco kostas 20c. (40 Sd.) por ĉiu linio. Kvarfoja anonco kostas 50c. (1 Sm.) por ĉiu linio. Linio enhavas proksimume 42 literojn punktojn aŭ spacojn.]

S-ro Hidajetula Khan, á la douane, Tabriz (Tabriz), Persia.

S-ro A. M. Flesher, Box 542, Nowata, Okla.

S-ro Antonin Valousek, Medlanky u Brna, Moravia, Austria, instruisto, deziras akiri el Ameriko kelkajn infanajn desegnaĵojn, por kiuj li sendos desegnaĵojn de siaj lernantoj.

S-ro W. Milewski, 209 Pierce Building, Boston, Mass., Usono, interŝanĝos "Amerika Esperantisto" kontraŭ aliaj esperantistaj gazetoj, precipe "Verda Standardo" kaj "Esperanta Penso."

S-ro Julian E. Fast, Delphos, Ohio. Ĉiam respondos.

S-ro D. Albert, Heros 24, Bilbao, Hispanujo.

Begin your letter—"Having seen your ad in AMERIKA ESPERANTISTO—"

Druckerei
Hochbau
Geodäsie

Wendebau
Straßenbau
Maurerei



“Venu al mia hejmo por aŭdi mian novan EMERSON”

Nenia bezono diri “Emerson pianon”

Al la plej multaj personoj la nomo “Emerson” signifas pianon

Tio montras la valoron de malnova kaj eminenta nomo

Vendistoj en la ĉefaj urboj de Usono

Petu katalogon

EMERSON PIANO COMPANY, Boston, [Mass.]